KOMUNIKOJ

Jaro 37-a JANUARO | FEBRUARO | MARTO 2013 N-ro 149

"Amu vian Dion per via tuta animo
kaj vian proksimulon kiel vin mem."
*Jesuo*

Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ
kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.
*Allan Kardec*

"La popoloj faros en konsento,
unu grandan rondon familian"
*Zamenhof*

# LORENZ KAJ BKE



La urbo Barra do Garças, en Brazilo, gastigis la 48-an Brazilan Kongreson de Esperanto kaj, kiel kutime okazas, la teamo de Eldonejo Lorenz tie ĉeestis kaj organizis sian tradician budon kaj ankaŭ spiritisman prelegon, kies temo "Reenkarniĝo, Eduka Vojo" estis brile disvolvita de sinjorino Maria Ester Pinto de Souza.

Tuj post la Brazila Kongreso, ni jam komencis organizi nian vojaĝon al Islando, okaze de la UK, kie ni ankaŭ vigle partoprenos organizante budon, prelegon kaj lanĉon de la tradicia Almanako Lorenz. Se vi volos, brazilano aŭ ne, kunlabori, partopreni nian teamon, skribu al ni kaj, kun granda ĝojo, karese, ni vin ricevos kun malfermitaj brakoj kaj koroj!

editora_lorenz@uol.com.br



## NI STIMULU NIAJN GEJUNULOJN!
## SE NI VOLAS RENOVIGI NIAN MOVADON,
## JEN BELA EKZEMPLO!



LEANDRO SILVESTRE kaj SABRINA MOTA, venkintoj de la Konkurso inter la gelernantoj de la Grupo de Esperanto Pac-horo, en Rio-de Ĵanejro, revenis el la Brazila Kongreso de Esperanto, en la ĉarma kaj ekologia urbo Barra do Garças, treege stimulitaj daŭrigi la studadon de Esperanto kaj partopreni pli aktive en nia Movado. Post la Kongreso ili diris:

"Mi neniam partoprenis kongreson de Esperanto, sed, ekde Barra do Garças, se eble, mi intencas ĉeesti multajn aliajn!" Leandro Silvestre

"Mi revenis el Barra do Garças konvinkita ke mi devas multe pli studi Esperanton kaj laboradi por nia Lingvo. Mi tre ŝatis la Kongreson!" Sabrina Mota

Ni pliatentigas, ke Grupo Pac-horo subvenciis ĉiujn elspezojn de la gejunuloj.
Jen grava ekzemplo. Kial ne organizi aliajn konkursojn?! Ni stimulu niajn gejunulojn!

# AL NIAJ FRATOJ, KIUJ NEAS LA SPIRITON



Al tiuj, kiuj aperis en ĉiuj tempoj por konfuzi la homan menson; al tiuj, kiuj vestis la malfidon per strangaj nomoj: prozopopero-metgnomio, telekinezo, kriptomnezo ktp., nian elkoran fratan respekton.

Al tiuj, kiuj vidis nur organisman forton kaj normalan senkoscian potencon antaŭ la okulfrapaj mediumaj fenomenoj, niajn piajn sentojn, kiujn ni kunligas kun la emociaj larmoj de la elstara sciencisto Cesare Lombroso antaŭ lia patrino tute materiiĝinta, klare videbla, dirante al li kun nepriskribebla amsento: “Cezaro, filo mia!”

Al tiuj, kiuj forcedis sian rezonadon al la tezoj pri trompo, iluzio, telepatio, hipnota indukto, prestidigito, mediaj fantomoj – kiuj ne povas kompreni la klaran mesaĝon pri amo kaj alvokon al la supera fido, elfluanta el la ĉielo kaj sindonanta al la Tero – ni ofertas nian aman komprenemon, kiun ni aldonas al la inteligento de la fama fiziologo Charles Richet (Medicino-Nobelpremio, 1913), ĉar li en Alĝerio ebligis al la materiiĝinta spirito Bien Boa montri la vivon de sia korpo per la karbonata precipitaĵo, kiam li spiris en glason de baria akvo, pruvante ne nur la forton de siaj pulmoj, sed ankaŭ la sangocirkuladon.

Al tiuj, kiuj akuzis, agresis, ŝtonĵetis kaj malbenis la honestajn spiritistojn en ĉiuj tempoj, kaj malrespektis la seriozajn eksperimentojn en laboratorioj sub la plej rigora teknika kontrolo, ni donas la silenton de nia toleremo pro obeo al la konsiloj de la Sinjoro, kiu super ĉio kaj ĉiuj prigardas nian ĝojon kaj disverŝas sian mizerikordon super la tutan Homaron.

Tamen, spirite genufleksaj kun elkora danko kaj profunda amo, ni ne povas ne akceli la vibradon de nia plej pura amo cele al tiuj martiroj de la mediumeco, kiuj tute sin oferis por la manifestiĝo de la Pli Granda Vivo, kaj pro tio estis katenitaj, ĉenligitaj, malliberigitaj, en vera rito de doloro kaj humiliĝo.

Ĉu povas esti pli granda feliĉo ol la certeco pri Lia justeco en la Eterna Vivo? Ni ne permesu, ke estingiĝu en nia memoro la misiistaj figuroj de Florence Cook, Eusapia Paladino, Madame D'Esperance, William Stanton, Moses, S-ino Piper, Linda Gazera, Peixotinho, Mirabelli kaj dekoj da aliaj, kiuj mortis ofte nekomprenitaj, por ke nun ni povu libere kaj sentime havi la konvinkon pri la Senmorteco de la animo.

El la Revuo “O Espírita”


LORENZ

SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Rua Francisco Vale, 57
Engenheiro Leal 21370-171 – Rio de Janeiro (RJ)
Brasil – Brazilo
Tel.: (21) **2221-2269** / (21) **2450-4768**

Skajpo: Lorenz Editora
Facebook: Editora Lorenz

editora_lorenz@uol.com.br






Kompostita de Rogério Mota


# LA SENMORTECO DE LA ANIMO KAJ LA GRAVAJ HOMOJ



"Ni estas devigataj diri – kiel Swedenborg: spiritus flat ub vult (la spirito blovas kie ĝi volas)." Sciencisto kaj Nobelpremio pri Medicino 1913, **CHARLES RICHET** (fondinto de Metapsikio)



"Timi la morton estas ignori la belecon kaj brilegon de la senfina spaco, kie pordo malfermiĝas al la animo laciĝinta de la surteraj elprovoj; estas konsideri kiel ombron la lumon plej brilan; estas forgesi, ke nenio perdiĝas, ĉio aliformiĝas."
**THOMAS EDISON** (letero adresita al la Prezidanto de la Kongreso pri Psikaj Esploroj – Ĉikago)



"La korpo de BENJAMIN FRANKLIN, presisto, kiel kovrilo de malnova libro kun la internaĵo disrompita, sen la titolo kaj orumaĵoj, ĉi tie restas por nutri la vermojn. Sed la laboro ne estos perdita, ĉar – kiel li kredas – ĝi aperos unu fojon pli en nova kaj pli eleganta eldono reviziita kaj korektita de la aŭtoro."
**BENJAMIN FRANKLIN** – (Skribinta sian epitafon)



"Mi estis tiel kompleta kaj konvinkita materialisto, ke eĉ ne en mia animo ekzistis loko por la spirita vivo kaj kiu ajn alia universala aganto, krom la materio kaj la forto. Sed la fakto estas ja obstinaj… La fakto min venkis." Sciencisto Sir **ALFRED RUSSEL WALLACE** (Naturalisto, rivalo de Darwin)



"La estuloj vivantaj en la Nevideblo, kiuj legas niajn pensojn, scias, ke jam de dudek kvin jaroj mi okupiĝas pri aferoj komencitaj kaj profundigitaj pro la tabloj (leviĝantaj tabloj, tre uzataj tiatempe por mediumaj kontaktoj). Pli ol fojon la tablo parolis al mi pri tiu laboro; la "Ombro de la Tombo" instigis min fari ĝin." **VICTOR HUGO**



"Kiam fine la kuniĝo de la animo kun la korpo ĉesos pro la morto, la vivo en la Transmondo ne estos io pli ol natura daŭrigo de la kunligo de la animo kun la korpo dum ĉi-malsupra vivo." **IMMANUEL KANT**

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof





**Al Dombrovski, 3.1.1890 (poŝtstampo)**

**Tre estimata Sinjoro!**

**Mi ricevis de vi 3 rublojn kun peto elsendi vortaron rusan (plenan) kaj vortareton por Latvoj. Sed aparta vortareto latva ne estas eldonita, tial mi sendas al vi plenan vortaron rusan kaj lernolibron por Latvoj (vi ilin ricevos post kelkaj tagoj). Ili kostos kune 1 r. 60 k. Ne sciante, kion fari kun la restaj 1. 40 k., mi sendas al vi por ili 46 vortaretojn por korespondado.**

**Kun ĝojo mi legis, ke vi komencis la tradukon de la vortareto por Litovoj. Se vi volas eldoni ĝin en tiu sama formo kiel la aliaj vortaretoj, ĝi kostos (por 1000 ekz.) ĉirkaŭ 20 rubloj. Mi konsilas al vi skribi pri tio ĉi al la presisto Kelter (Varsovio, Nowolipie 11) kaj li respondos al vi detale. Por la verkoj internaciaj ne ekzistas konsilanta cenzoro, la plej granda parto de la verkoj iris tra la manoj de la Varsovia cenzoro A. Lagodoski (ruso). La aferon de la cenzuro jam prenos sur sin la presisto.**

**Al Majnow, 19.01.1890**

**Estimata Amiko!**

**Vian leteron mi ricevis.**

**Mi konfesas ke mi persone mem ankaŭ ne estas amiko de akademio kaj vidas en ĝi danĝeron, sed ne volante preni la aferon sur min, mi prezentas ĝin al la amikoj. Se la ligo estos kreita, mi ĉiam penados ke ĝi en la lingvo ŝanĝu kaj rompu la plej malmulte. Ĉu vi konsentas ke mi ŝanĝu en via letero iom da stilo kaj presu ĝin en la "Esperantisto"?**

**P.S.: Leteron al la grafo Tolstoi mi ne skribis; mi sendis al li nur la adresaron kaj vortareton kun antaŭparolo.**

# DIO

*Neilton Guimarães*

Mi serĉis Vin ĉi-tage,
Alvokis Vian nomon,
Kaj tion kun granda malespero,
Tamen, absolutis l'silento.

Mi serĉis Vin sur la strato,
Nuda kaj nekonscia,
Mi serĉis Vin en la Luno,
Kaŝita kaj malatenta.

Mi serĉis Vin en la Spaco,
Enbruste malplena,
Sangon pumpanta,
Sen iluzio kaj maŝinece.

Mi serĉis Vin en la dormoĉambro,
Senlustra kaj sufoka.

Mi serĉis Vin en la amiko,
Amiko senrilata.

Mi serĉis Vin en la kamparo,
Kamparo senpejzaĝa.

Mi serĉis Vin... Mi serĉis Vin...

Mi serĉis Vin en la kvar ekstremoj de la Tero,
Dum la sezonoj,
Sezonoj maldifinitaj,
Kaj kun granda malekvilibro.

Tiam, mi serĉis Vin en la penso,
Ekburĝona, manke de pasinto,
Penso je energio,
Penso kvazaŭ tempo,
Tempo, kiun mi dediĉis,
Tiam, mi aŭskultis Vin, mi trovis Vin.



Tradukis esperanten: Jader Rodrigues da Silva

## AL AMIKOJ DE LORENZ

Estimata ano de Lorenz, ni petas komplezon: kiam vi deponos la pagon de la jarkotizo al nia Eldonejo, bonvolu nin sciigi, ĉar multaj same tion faras kaj ni ne sukcesas identigi de kiu estas la depono.
Se vi ankoraŭ ne realiĝis, jen estas tempo; se vi ankoraŭ ne aliĝis, petu vian aliĝilon kaj helpu nin por la disvastigo de Spiritismo tra la tuta mondo, kaj sciu kion vi ricevos en la komforto de via hejmo.

## ĈU VI ANKORAŬ NE REALIĜIS POR 2013?!!!

Se vi ankoraŭ ne realiĝis, ne forgesu ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj. Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj kun plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la komforto de via hejmo.
Dio benu vin!

**editora_lorenz@uol.com.br**

Tel. (21) **2221-2269**



## AMIKOJ DE LORENZ


Ĉeha samideanino Jarmila Rŭznarová estas veteranino de nia Movado.
Ŝi neniam ĉesis aktivadi por Esperanto kaj multaj aliaj belaj aferoj. La nobla Fratino delonge kunlaboras kun Eldonejo Lorenz, verkante interesajn artikolojn por Almanako Lorenz. Sen ia dubo, ŝi meritas niajn gratulojn kaj dankojn! Jen imitinda ekzemplo! Elkoran dankon, **JARMILA!**

# POSEDAĴOJ

Klopodu uzi monon, korpon kaj tempon por la bono.
Riĉaĵoj transloĝiĝas de domo en domon.
La korpo konsumiĝas laŭ la tempopaso.
Havaĵoj, kiujn vi arigas, diseriĝos en heredojn.
Laŭ la leĝoj de Dio, vi havas nur tion, kion vi donas.
Via trezoro konsistos nur el viaj bonaj agoj por la aliaj.

Emmanuel
Mediumo: Francisco Cândido Xavier
Tradukis esperanten: Jader Rodrigues da Silva

El la libro “Migalhas” (FEB)
(União Espírita Mineira/Minasa Spiritisma Unuiĝo)




## LANĈO

Finfine ĝi alvenis: ALMANAKO LORENZ 2013, enhavante artikolojn el la plej diversaj anguloj de la mondo: Trevor Steele kaj Bob Felby (Aŭstralio), Renato Corsetti (Italio), Firdaus Sukurov Sukurov, Prof. Sergej Grigorjevich kaj Dr. Saidmurod Hogazod (Taĝikio ), Roger Degrelle (Francio), Aurora Bulte (Rumenio), Bardhy Adem Selimi (Albanio), Anatoli Ionesov (Uzbekio) kaj ankaŭ brazilanoj partoprenas. Tamen, ni pliatentigas koncerne la artikolon de la brazila samideano, Ciro Gomes de Freitas pri “Komplekso de la Geodezia Centro de Brazilo”, kaj ankaŭ pri la tre interesa artikolo de Renato Corsetti: “Spiritistoj parolas pri Frateco – La Mondo Parolas pri Malfrateco”.
Ne perdu tempon kaj petu tuj vian ekzempleron!

Lanĉa prezo: 4 eŭroj
190 paĝoj | 15,5 x 22 cm
Tel.: (21) 2221-2269 / (21) 2450-4768 | editora_lorenz@uol.com.br

# Alberto  Flores

## ESPERANTO-TERAPIO

Ŝajnas ke, la 90-jaraĝa inĝeniero Alberto Flores estis la inventinto de la esprimo “Esperanto-Terapio”. Li uzas ĝin por la “Senpaga Kurso de Esperanto”, kiun li gvidas ĉiun merkredon, de la 8h30 ĝis la 10h30, en la “Centro de Malsanprevento por Majunuloj” de la Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj de la urbo Volta Redonda el la ŝtato Rio-de-Ĵanejro.


Estas pruvite, ke la studado de lingvo ege simpla, kia Esperanto, stimulas neŭronojn kaj evitas aŭ prokrastas aperon de memorproblemoj kaj aliaj cerbaj misfunkcioj.



Esperanto-Terapio, krom esti agrabla okupterapio, estas ilo kapabla disvolvi societemon en la lernantoj kaj ties memestimon kaj memfidon. Plie, ĝi ebligas novajn amikecojn kaj plezuron je la kunvivado kun la ceteraj kursanoj, kaj ankaŭ kompreni plibone la gramatikon kaj la uzon de la portugala lingvo.

Estas ĉiam interese konstati la entuziasmon kaj ĝojon ĉe la triaĝuloj, partoprenantaj Esperanto-Terapion, alivorte, la Senpagan Kurson de Esperanto de instruisto Flores, en Volta Redonda.


Se vi volos koni aliajn detalojn pri la kurso, skribu al samideano Alberto Flores: Rua 19 – B, 259 – Bela Vista, Volta Redonda, RJ, Brasil – 27262-350




Jen ero el **ALMANAKO LORENZ 2012** de la intervjuo kun la brazila samideano ALBERTO FLORES. Se vi volos ricevi Almanakon por legi la kompletan intervjuon de Flores, petu kaj ni tuj ĝin sendos al vi.

**Komunikoj**: Kion signifas Esperanto kaj Spiritismo en via vivo?

**Flores**: Spiritismo kaj Esperanto estas nun miaj ĉefaj okupoj. Mi ne eblas imagi mian vivon sen ili. La ideo kaj la idealoj de ambaŭ kompletiĝas kaj plenigas mian vivon.


**ENFOQUES DOUTRINÁRIOS – Vol. 3**
Danilo C. Villela
ISBN 978-85-86984-60-0 • 256p. • 13,5 x 18,5cm

Eis novamente o nosso dileto Irmão e Coidealista, Danilo Villela, lançando agora pela Editora Lorenz, o seu 3º livro da série “Enfoques Doutrinários”, com estudos absolutamente calcados em “O Livro dos Espíritos” e no “Evangelho Segundo o Espiritismo”. De fato, é uma obra para todo estudioso em Doutrina Espírita, pois o autor desenvolve os temas de forma simples e clara, com interpretações seguras, sempre fundamentadas na Doutrina Espírita. É, sem dúvida, uma fonte de estudos dos livros da Codificação e também de grande utilidade para as leituras do Culto do Evangelho no Lar, como também nas reuniões da Casa Espírita. Morte das Crianças, Escolha das Provas, Casamento, Flagelos Destruidores, Direito de Propriedade, Carregar a sua Cruz, Liderança, Traje Nupcial, Sucessão das Raças, Mansidão, Cólera... são alguns dos 100 temas desenvolvidos pelo autor. Peça já o seu exemplar e bom estudo!

Tel.: (21) 2221-2269 / (21) 2450-4768 | editora_lorenz@uol.com.br